# Informilo

Monata revuo
Maandelijks tijdschrift

7a jarkolekto n-ro 7
septembro 1987

23 -09- 1987

A T E N T I N D A Ĵ O J

17.10.1987

- ekde 08.30 h : estrarkunsido
- ekde 13.30 h : Ĝ E N E R A L A  K U N S I D O

Sekve de antaŭa decido, ni dufoje en la jaro kunsidas.
Laŭ tiu ĉi vojo, ĉiuj membroj de F.E.L. estas invititaj al tiu ĉi dua ĝenerala kunveno de 1987.
LA GRUPESTROJ BONVOLU AVERTI SIAJN KLUBAJN GEMEMBROJN KAJ INVITI ILIN.

Tagordo

- kotizŝanĝoj
- kunordigo de rapidkursoj
- propono al U.E.A. rilate ekologian protekton
- diversaĵoj

**Informilo**, kadro-revuo de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. - Jarabono: 150 BEF - Kontoj: 402-5510531-55 kaj 000-0265338-43 - Respondeca eldonanto *(verantwoordelijke uitgever)*: Monique Caestecker, Kerkstraat 66, 9940 Sleidinge.

---

## ESTRARO

**A. Kunordigado:**
Ivo Durwael, prezidanto, Paul Gilsonlaan 5, 2520 Edegem,
tlf. (03) 440 30 92.
Monique Caestecker, sekretario, Kerkstraat 66, 9940 Sleidinge.
Jan Bovendeerd, konsilanto, Meidoorn 42/2, 2510 Mortsel,
tlf. (03) 449 50 06.

**B. Financo kaj administrado:**
Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, 8000 Brugge,
tlf. (050) 33 00 04.
Alex Humet, Campenhoutstraat 4, 2600 Berchem.

**C. Informado:**
Edward Symoens, Putsesteenweg 131 A, 2180 Kalmthout,
tlf. (03) 666 62 66.

**C. Intergrupa agado:**
Hilde van Ingelgem, Arbeidsstraat 21, 9300 Aalst,
tlf. (053) 70 50 11.

## KOMISIITOJ

**Eldona agado**: Chris Declerck, Amerikalei 153/2, 2000 Antwerpen.
**Manlibro de la aktivulo**: Marc Vanden Bempt, Duisburgsestraat 12, 3030 Heverlee, tlf. (016) 20 14 53.
**Gazetara servo**: Herman Deceuninck, Villalaan 1 b 4, 1500 Halle, tlf. (02) 360 99 49.
**Rebata servo**: Germain Pirlot, Kemmelbergstraat 5/3, 8400 Oostende, tlf. (059) 70 87 00.
**Instruado**: Petro de Smedt, Hemelstraat 44, 9330 Dendermonde, tlf. (052) 21 26 77.
**Libroservo**: Erik D'Hondt, Wilgstraat 25A, 9440 Erembodegem, tlf. (053) 77 44 97.

---

# P R O T O K O L O

pri la estrarkunsido de sabato la 12-an de septembro 1987 en Antverpeno

---

Ceestis : Monique Caestecker (MC), Ivo Durwael (ID), Paul Peeraerts (PP),
Roland Rotsaert (RR), Hilde Vaningelgem (HV)
Senkulpigis : Jan Bovendeerd (JB), Alex Humet (AH), Edward Symoens (ES)
Komenca horo : 10.20 h
Prezidas : ID; protokolas : MC

1. ANTAŬA PROTOKOLO

Aprobite, krom punkto 3.1., legu fine de linio 5 : ... nek flanke de B.R.T., la festprogramo antaŭvidita en decembro ne restas la afero de F.E.L. sed de ĉiu esperantisto en Belgio.

2. TAGORDO JARKUNSIDO (ankaŭ vidu titolpagon de ĉi tiu "Informilo")

2.1. Kotizoj

La tendenco instigas nin por plialtigi la kotizon.
La estraro proponas por individua membro 400 BF (inkluzive Eperanto-panoramo) dividita jene : 250 fr. al F.E.L. kiu transprenos la aldonvaloran imposton (kiu iras al la ŝtato) kaj 150 fr. nete al la grupo. Familia kotizo : 800 BF (por du aŭ pli da personoj). Dumviva membro : kiel antaŭe : 25 x la individua kotizo : 25 x 400 = 10.000 fr., kun aparta atento ke oni povas ankoraŭ aliĝi kiel dumviva membro por 5.000 fr. ĝis la 31-a de decembro 1987.

2.2. Kunordigo de rapidkursoj

Ni deziras organizi iun sinsekvon inter la diversaj rapidkursoj de la diversaj grupoj.

2.3. Ekologia propono
Temas pri propono al U.E.A. rilate aldonan frazon al ĝia statuto, pri ekologia protekto.

2.4. Ekzamenoj

Rilate la unuecigon de la Esperanto-ekzamenoj, ni konstatas ke devas esti starigita komisiono. Ni unue kontaktos ES por sciigi la evoluon de ĉi tiu punkto ene de I.L.E.I. Pro tio, la estraro opinias ke la unuecigo de la ekzamenoj ne estos pridiskutata en la ĝenerala kunveno de oktobro.

3. FERMO DE LA JUBILEA JARO

3.1. ID skribis leteron al Cas Goossens (B.R.T.) por ke li instigu programiston al invito de internacia esperanto-publiko (multe da eksterlandaj esperantistoj loĝas en Belgio) okaze de iu programo kaj eventuale en tiu programo substreki la valoron de Esperanto kiel pontlingvo inter diversaj kulturoj.

3.2. ID havis kontakton kun Emile Van Damme (EVD) kaj Marc Demonty (MD) rilate la feston de la 12-a de decembro 1987. EVD kaj MD pretas kunlabori kaj serĉos taŭgan salonon en Bruselo.
La estraro decidas eluzi parton de la jubilea mono por tiu publika manifestacio kaj peti kroman enirprezon. La gajno de tiu enirprezo estu destinita por Zairio sub formo de senpaga presado de lernolibro kiun EVD faras speciale por afrikaj esperantistoj. Tiamaniere parto de la jubilea mono konkrete helpos al afrikanoj kiuj multnombre deziras lerni Esperanton sed ne havas la financajn rimedojn.

4. LERNEJA PROJEKTO

4.1. Grégoire Maertens kontaktis ministron Coens kiu proponis ke tiu projekto eniru la lernejojn kadre de la "Mundiale Vorming". La ministro promesis kontakti siajn specialistojn. André Staes havis kontakton kun la respondeculo de tiu "Mundiale Vorming" kiu tre favore reagis sed povis fari nenion ĉar ne ricevis ankoraù komision de la ministro mem. Necesas nova instigo ĉe Coens. Grégoire Maertens rekontaktos lin.

4.2. "Bond zonder Naam" volas apogi tiun projekton ĉe siaj gvidantoj.

5. N.G.G.E.

La Nederlanda grupo por Esperanto-geinstruistoj organizos kadrokursojn en 1988. Ni petos al Gerard Gerritse por ke li informu nin pri la planitaj tagoj tiel ke ni povas tempe diskonigi ilin al niaj membroj en Flandrio.

6. ESTRARKUNVENO

Ni decidis dividi la kunvenon en du partoj : ekde la 08.30 h. ĝis la 10.00 h. pri financoj (ID, PP, RR), poste la normala estrarkunsido.

7. INTERGRUPA AGADO

HV pretas kunordigi ĉion rilate proponojn por prelegvojaĝoj.

8. "VLAANDEREN LEEFT"

Manifestacio okazos en Gent de la 23-a de aprilo ĝis la 1-a de majo 1988. Socia-kulturaj organizaĵoj rajtas havi standon. ID kontaktos la sekretariejon de "Vlaanderen leeft" por ekscii pli da detaloj.

9. NATUURBEURS

Ĝi okazos de la 5-a ĝis la 13-a de marto 1988. Ĉar ĝi nomiĝas "Natuur- en tuinbeurs" kaj konsiderante ke ĝi estas pli komerca ol antaùe, la estraro decidis rezigni pri partopreno. Ni opinias ke la "Vlaanderen leeft"-manifestacio estas pli interesa kaj ni deziras uzi niajn fortojn en tiu direkto.

10. BUĜETO F.E.L.-KONGRESO 1988 EN GENT

La estraro akceptas unuanime la buĝeton proponitan de la Genta Esperanto-grupo.

11. PROPAGANDA-AFIŜO "ESPERANTO, TAAL IN BEWEGING

Ĝi estos preta je la fino de oktobro.

12. SUBSKRIBOJ

La estraro decidas ke RR kaj MC ankaù rajtas subskribi dokumentojn por F.E.L.

Fino de la kunsido : 13.20 h.